

Alexander Puschkin,

Al...

tradukita de Manfred Retzlaff

Esperantigo laŭ la rusa origina teksto.

Memoras ofte mi pri tio:
aperis iam vi al mi,
samkiel fuĝa mir-vizio,
de l' pura belo la geni'.

En la turmentoj de l' amaraj
afliktoj kaj melankoli'
aperis viaj trajtoj karaj,
la mildan voĉon aŭdis mi.

La jaroj pasis, forbloviĝis
subite tiuj sonĝoj ĉi,
la belaj trajtoj ekpaliĝis,
forĝesis vian voĉon mi.

Kviete pasis tagoj miaj
en la ekzil', sen emoci',
sen Dio, sen inspiroj iaj,
ne ploris, vivis, amis mi.

Vekiĝis nun animo mia,
kaj ree ekaperis vi,
samkiel fuĝa vid' vizia,
de l' pura belo la geni'.

...

Alexander Puschkin,

Al....

tradukita de Manfred Ratislavo

Esperantigo laŭ la germana traduko de Karoline Jänisch

Momenton vi ja estis mia,
vi foje staris antaŭ mi,
Vi pura ideal' gracia
de l' belo efemera vi.

Dolor-espere sopirante,
en la bruado de l' homar'
la dolĉan voĉon ekaŭdante,
mi sonĝis pri l' okulo-par'.

Sed dum la viv-batal' multjara,
dum la restado en la sol',
paliĝis la memor' de l' kara
aspekto via kaj parol'.

Mi jarojn en karcero restis,
ne kredis plu je l' kara Di',
malplena mia brusto estis,
ne ploris, vivis, amis mi.

Saniĝas nun animo mia.
Vi ree staras antaŭ mi,
vi pura ideal' gracia
de l' belo efemera vi.

...

Nun ree batas kun sentemo
 en mia brusto mia kor',
 inspir' revenis kaj kredemo
 kaj viv' kaj am' kaj ree plor'.

*Traduko de la Rusa poemo "K...." de ALEXANDER PUSCHKIN (*1799-05-26 – †1837-01-29) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2006-09-20.*

MR-153-6 / Arg-305-730 (2006-12-04 12:17:37)

*Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff, *04.11.1938) en Decembro de 2000 laŭ la origina rusalingva teksto.*

Nun ree batas kun pasio
 La vekiĝinta kor' en mi,
 denove ardas ĝi por Dio
 kaj vivas, ploras, amas ĝi.

*Traduko de la Rusa poemo "K...." de ALEXANDER PUSCHKIN (*1799-05-26 – †1837-01-29) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-05.*

MR-153-2a / Arg-305-618 (2006-09-20 09:31:05)

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, faris laŭ la germanigo de s-ino Karoline Jänisch (Pawlowa).